Jarraporto de la Retpaĝestro

Dum la jaro 2008, mi daŭre subtenis la retpaĝaron de Esperanto-USA. Ni ĝisdatigis la softvaron kaj aldonis kelkajn novajn kapablojn, inter ili la kapablon aldoni bildojn, enmeti bildojn en afiŝojn, kaj "rigardadi" afiŝojn, tiel ke oni ricevu epoŝtojn kiam estas nova komento aŭ ŝanĝo de la afiŝo. Ankaŭ dum tiu ĉi periodo, la direktoro tranprenis la retbutikon al nova sistemo.

La retpaĝaro fariĝas nepre la plej ofta perilo por informpetintoj al Esperanto-USA -- ĝis cent monate. Tim Westover daŭre laboris por starigi efikajn "adwords" kampanjojn pere de Google. Dum la periodoj en kiuj la kampanjoj estas efikaj, ni notis duobligon de la trafiko ĉe la retpaĝaro.

Efikan temon de retpaĝestroj daŭre atentas la retpaĝaron kaj kontrolas la sistemon. La enhavon de la retpaĝaro, multaj homoj daŭre prilaboras kaj ĝisdatigas. La nombro da homoj kiu regule verkas blogafiŝojn atingis 16 dum la jaro. Oni ofte proponas 14 kiel la minimuna por mem-subtena komunumo, do mi traktas la laboron sukcesa.

Ni starigis novan iniciaton por trovi homojn kiuj verkos specialan blogon pri certaj interesoj. Ni trovis Darcy Ross por verki blogon pri starigo de nova loka grupo kaj Asiya Ali pri la komencanta sperto. Unu en la novaj blogistoj starigis enketon kaj kelkaj el ni daŭre ofertas novan enketon plimalpli semajne, kiu ŝajnas esti ŝatata ĉe la retpaĝaro.

Mi esperas ke dum la venonta jaro, mi trovos la homforton renovigi la grafikajn artaĵojn de la drupala "temo".

Steven D. Brewer
<limako@bierfaristo.com>